

La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

merkredon, la 4an de Julio, 2017 • numero du

Hodiaŭ • Today

★ 7:30 – 8:15 atm: Matenmanĝo / Breakfast

★ 8:30 atm – 12:15 ptm:

- Grupa orientiĝo kaj foto (por ĉiuj) *Flowe 110*
- Lecionoj (Alexander, Kováts, Löwenstein)
- Group orientation and photo (for everyone) *Flowe 110*
- Classes (Alexander, Kováts, Löwenstein)

★ 12:30 ptm: Tagmanĝo / Lunch

★ 2:00 – 5:30 ptm: Lecionoj (Vergara)

★ 5:45 ptm: Vespermanĝo / Dinner

★ 7:00 ptm:

Diskutrodo pri reta eldono de filmetoj / Roundtable discussion about publishing videos on the internet

Flowe 110

Legu pli da informo en paĝo 3
Read more on page 3

★ **Post la diskutrodo:** Gufujo

Kio okazas en gufujo?

de Hanso BECKLIN

Saluton! Mi nomiĝas Hanso, via gufestro, kaj mi volas inici vin en la sekretojn de la NASKa gufujo!

- La gufujo malfermiĝos ĉiun vesperon de NASK 30 minutojn post la anoncita finiĝo de la lasta programero. Se fino de programero ne estas anoncita, la gufestro klopodos avizi partoprenantojn pri la komenciĝa horo. La gufujo fermiĝos je la 11 ptm.
- La gufujo situos en la kvara kaj tria etaĝoj de la ĉefa konstruaĵo.
- En la gufujo oni trinkas teon kaj kafon, babilas, tabulludas, legas, kantas kune aŭ sola, kaj ĝenerale ĝuas kvietan, plene Esperantan etoson.
- Por aliĝi al la gufaro, oni aĉetas gufkarton. La karto kostas 10 dolarojn kaj estas truebla dekfoje. Kontraŭ ĉiu truo oni povas aĉeti aŭ unu tason da teo kaj kekson, duontason da kafo kaj kekson (t.e., plena taso da kafo, kiu estas multe pli kosta kaj postulas pli da energio de la gufestro, kostas du truojn) aŭ tri keksojn.
- Gufoj povos elekti inter multaj altkvalitaj specoj de teo kaj tizano. Aparte menciinda estas la bongusta malvarma hibiska tizano, kiu estas sukerita kaj plaĉos al tiuj, kiuj ŝatas limonadon, kolaon, kaj malvarmajn trinkaĵojn dum somero!



Esperanto “gluas” homojn kunaj

de Lee (Liĉjo) MILLER (English version follows)



Mi tre feliĉas ke vi elektis veni al Raleigh kaj partopreni en NASK 2018. Ni havas grandan grupon de lernantoj, kaj grandan teamon. Oni malofte en Usono povas tiel vivi inter tiom da Esperantistoj dum ok tagoj!

Okazos lecionoj ĉiutage, sed la plej grava flanko de NASK estas la komunumo. Vi renkontos novajn amikojn de diversaj aĝoj, lokoj, pensmanieroj, kaj lingvoniveloj. Kaj pluraj el vi renkontos malnovajn amikojn, el aliaj jaroj aŭ eventoj.

Ekzistas gluo en Esperantujo. Ni estas kunligitaj de komuna intereso pri komuna lingvo. Multaj homoj hodiaŭ

ekinteresiĝas pri Esperanto, kaj por kelkaj la interna ideo de Esperanto, ke ni ĉiuj estas egalaj, “sonorigas la sonorilon” de la animo. Mi ne devas konsenti kun vi por respekti kaj eĉ ami vin. Bezonata sinteno en nia mondo hodiaŭ!

Por iu kiu estas nova lernanto de Esperanto, mi ĉiam konsilas, ne timu paroli. Vi ja rajtas ne paroli, kompreneble. Ne estas devo. Kaj eble dum la unuaj 2-3 tagoj via kapo doloros pro la lingvo-medio. Sed konsciu ke vi povas lerni ĉion hejme, sen NASK, sen instruistoj: gramatikon, vortostokon, frazojn. Krom la kapablo aktive uzi la lingvon kun aliaj homoj, konstante, ĉiutage, pri ĉio ajn. Eĉ se vi ne pripensis tion, tial vi venis al Raleigh. Do, estu kuraĝa, ne timu erarojn, kaj ĝuu nian mondon de la Internacia Lingvo. (daŭras en paĝo 3 / continues on page 3)

Salutoj de niaj instruistoj

Anna LÖWENSTEIN

Anna LÖWENSTEIN instruas la kurson pri literaturo kaj lingvo



Por kelkaj el vi ĉi tiu jam estas la 3a, la 4a, la 7a, la 10a NASK, sed por aliaj ĝi estas la unua. Eble vi venos iom necerte, ne sciante precize kion atendi. Nu, ankaŭ por mi ĉi tiu estas la unua sperto pri NASK, kaj ankaŭ mi ne scias, precize kion atendi. Mia celo estas gustumigi kelkajn el la plej famaj verkoj de la Esperanta literaturo, ĉu modernaj ĉu klasikaj, ĉu originalaj ĉu

tradukitaj, de verkistoj el la tuta Esperanta mondo. Ni esploras kelkajn angulojn ankoraŭ ne sufiĉe konatajn el la plej variaj kategorioj: noveloj, romanoj, poezio, proverboj kaj teatraĵoj. Al tio ni povos aldoni diskutojn pri la Esperanta vortokreado, gramatikajn ekzercojn, aktoradon de scenoj – kaj eĉ kantadon.

José Antonio VERGARA

José Antonio VERGARA instruas la kurson pri movado, kulturo kaj lingvo



Post 5 jaroj, mi revenas al NASK plena je entuziasmo kaj dankemo pro la nova ŝanco instrui en tiu ĉi grava evento. Post plurhora, diversetapa flugado el mia loĝurbo (Puerto Montt, Ĉilio), mi finfine atingis Raleigh lunde matene, kun skua salto el vintra, pluva vetero, al la varmega somero de Norda Karolino. Mi tre ĝojas renkonti malnovajn geamikojn kaj konatiĝi

kun novaj, kaj ĉefe, ke ni tiom amase grupiĝas ĉi tie por kune ĝui nian mirindan lingvon Esperanto. Mi bonvenigas ĉiujn lernantojn kaj aparte tiujn kiuj partoprenos miajn lecionojn en la supera nivelo. Mi forte deziras ke ni kunlernu per interesa, tolerema kaj vigla diskutado!

Renato CORSETTI

Renato CORSETTI estas gast-preleganto



Karaj NASK-uloj,
Estas por mi plezuro malkovri Amerikon. Mi jam estis en Ameriko aliajn fojojn sed ne en la amerika Esperantujo. Tiam, antaŭ 30 jaroj, mi pensis, ke mi parolas la anglan. Nun mi finfine komprenis, ke mi ne parolas ĝin. Bonŝance ni povas interkompreniĝi per Esperanto.

Mi portas al vi la rakontojn pri la malnova Esperantujo en Eŭropo kaj se vi interesiĝas, mi povas rakonti al vi kiel funkciis la mondo, kiam ne ekzistis Facebook, Skype kaj entute komputiloj. Nun tiu epoko ŝajnas al ni pli proksima al la tempo de la dinosaŭro ol al la nuna mondo.

Sed eble pli interese mi povas rakonti al vi, kiel funkcias la nuna Esperantujo ekster Usono kaj kial estas signoj de espero rilate al progresoj de Esperanto se ne rilate al la fina venko.

Mi antaŭvidis prezenti bildon de nia multfaceta movado, pri lingvaj problemoj inter la parolantoj de Esperanto kaj pri denaska akirado de Esperanto, sed mi estas preta interveni ankaŭ pri aliaj aspektoj de nia movado, se iu el vi interesiĝas pri tio. Simple petu min.

Katalin KOVÁTS

Katalin KOVÁTS instruas la meznivelan kurson



Jen Katalin Kováts, jam preskaŭ veterana NASK-ulino. Mi estas hungarino, sed loĝas jam de multaj jaroj en Nederlando kun mia franca edzo kaj nia poliglota filo. Nia hejma lingvo estas Esperanto. Profesie mi estas diplomita instruisto pri matematiko, kaj pri la lingvoj: rusa, itala kaj Esperanto.

Mi estas la redaktorino de la retejo edukado.net kaj verkis kelkajn lernolibrojn, kiuj multe povos helpi vin en la studoj, ekzemple *Poŝamiko* kaj *Ĉu vi aŭdis, ke...*

Ĉi-jare mi laboros kun la meza nivelo, okazigos kun Renato Corsetti la KER-ekzamenojn, kaj povos informi vin pri la projekto *EKPAROLU!*

Mia manio estas akuzativo, simple observu bone mian nomon: kataliNNNNN. Mi estas ankaŭ vitroartisto, kaj mi volonte rakontos al vi pri tiu arto kaj povos vidigi al vi kelkajn el miaj produktoj.

Mi esperas denove tre agrablan kaj fruktodonan laboron al vi kaj al ni ĉiuj!

Tomaso ALEXANDER

Thomas (Tomaso) ALEXANDER instruas la kurson por komencantoj



Saluton al ĉiuj lernantoj, al amikoj malnovaj, novaj, kaj ankoraŭ-ne-konataj. Mi vere antaŭguas kun-sperti NASK-on kun vi. Mi mem lernis Esperanton antaŭ multaj jaroj sed mi komencis veni al NASK nur antaŭ tri jaroj – komence kiel lernanto, poste kiel kun-instruisto de la postbaza kurso, kaj ĉi-jare kiel instruisto de la kurso por komencantoj.

Jam de multaj jaroj mi instruas Esperanton en la reto. En la komenco mi instruis per retpoŝto, kaj lastatempe mi instruas en YouTube kaj italki (per skajpa leciono). Estas agrable finfine ekkoni multajn el miaj lernantoj vid-al-vide. Mi ankaŭ antaŭguas la grandan grupon de komencantoj. Estas vera honoro esti via unua instruisto de Esperanto.

Amike salutas,
Thomas/Tomaso ALEXANDER.
Esperanto Variety Show
NightinGael Hammered Dulcimer

Diskutrondo pri reta eldono de filmetoj

de Derek ROFF kaj Alena ADLER (English version follows)

Bonvenon al NASK kaj al KTF, la Kino-Teatro-Festivalo. Ni invitas vin partopreni en la unua vespera programo, kiu estos diskut-rondo pri la aperigo de videoj en la reto. Tomaso Alexander, Charlotte Burton, kaj Alekso Miller, kiuj havas multajn spertojn pri la kreado de valoraj filmetoj en kaj por Esperanto, respondos demandojn de Alena Adler, Derek Roff, kaj de VI!

Se vi interesiĝas pri spektado, kreado, aŭ la ĝuado de retaj filmetoj, tiu sesio estas por vi. Se vi deziras lerni pri tekniko, verkado, aktorado, aŭ muntado, venu kun viaj demandoj.

Estos io por ĉiuj, kiuj rekonas la gravecon de reta video en la moderna mondo, speciale por junuloj kaj por Esperanto.

La sesio okazos en Flowe 110, la granda ĉambro de la klaso-konstruaĵo. Ni komencos je la 7a vespere. Venu, ĝuu, demandu, kaj lernu.

Welcome to NASK and to KTF, the Kino-Teatro-Festivalo (film and theater festival). You are invited to participate in

Esperanto “gluas” homojn kunaj

daŭrigo de artikolo de paĝo 1 / continued from page 1

I'm so happy you decided to come to Raleigh and participate in NASK 2018. We have a big group of students, and a big team. It's not often in the US that you can live with so many Esperanto speakers for eight days!

There are class sessions every day, but the most important aspect of NASK is the community. You'll meet new friends of diverse ages, locations, ways of thinking, and language ability. And many of you will meet old friends, from previous years and other events.

There's a glue in Esperantujo. We're connected by a common interest in a common language. Lots of people today are interested in Esperanto, and for some the Internal Idea of Esperanto, that we are all equal, “rings the bell” of the spirit. I don't have to agree with you to respect you and even love you. That's an important perspective in today's world.

For anyone who's new to Esperanto, I always advise not to be afraid to speak. You can choose not to, of course. Nothing is required. And maybe during the first 2-3 days your head is going to hurt because of the language environment. But be aware that you can learn everything at home, without NASK, without a teacher: grammar, vocabulary, sentences. Except for the ability to actively use the language with other people, constantly, every day, about everything. Even if you didn't think about that, that's why you came to Raleigh. So be brave, don't be afraid of mistakes, and enjoy our world of the International Language.

the first evening program which will be a roundtable discussion concerning making videos available on the web.

Tomaso Alexander, Charlotte Burton, and Alekso Miller, who have great experience in the creation of valuable films in and for Esperanto, will answer questions from Alena Adler, Derek Roff, and from YOU!

If you are interested in seeing, making, or enjoying Internet films, this session is for you. If you want to learn about techniques, script writing, acting, or editing, come with your questions. There will be something for everyone who recognizes the importance of Internet distribution of video in the modern world, especially for young people and for Esperanto.

The session will be in Flowe 110, the big room in the classroom building. We will start at 7 pm. Come, enjoy, question, and learn!

Carpe Diem

El “A Manual for Cleaning Women”

de Lucia BERLIN, tradukita de Hanso BECKLIN

Plejparte estas al mi bone pliaĝiĝi. Kelkaj aferoj ja ĉagrenas min, kiel rulsketistoj. Ili ŝajnas tiom liberaj, kun siaj longaj glitantaj kruroj kaj haroj fluantaj en la vento. Aliaj aferoj panikas min, kiel la pordoj de la rapidtrajno. La atendo post la halto antaŭ ol malfermiĝas la pordoj estas tro longa. Ne tre longa, nur tro longa. Tempo mankas.

Kaj lavejoj. Ankaŭ dum mia junaĝo ili prezentis problemon. Ili daŭras tro, eĉ la rapidaj lavmaŝinoj. La tuta vivo povas pasi dum la sidado tie. Dronanto oni estas. Kompreneble, se mi posedus aŭton mi povus iri al la ilvendejo aŭ al la poŝtofiĉejo kaj poste reveni por meti ĉion en la sekigilon.

La lavejoj sen dungitoj estas eĉ pli malbonaj. Tiam ŝajnas al mi, ke mi estas la ununura homo tie. Sed vestoj okupas ĉiujn el la maŝinoj, ĉar ĉiu butikumas en la ilvendejo.

Mi konas tiom da lavejaj dungitoj, tiuj ŝvebantaj Karonoj, foje ŝanĝantaj biletojn kontraŭ moneroj, foje rifuzantaj tion. Nun mi konas la dikan Ofelion, kiu elparolas “Sen peno” kiel “Then pehno”. Ŝi rompis siajn kromdentaron per peklita bovaĵo. Ŝiaj mamoj estas tiom grandaj, ke ŝi devas manovri por pasi tra pordoframon, kvazaŭ ŝi estus manĝotablo. Kiam ŝi venas en la koridoron kun ŝvabrilo, ĉiu movas sin kaj ankaŭ siajn korbojn. Ŝi akridas de televidkanalo al kanalo. Ĝuste tiam, kiam ni estas pretaj spekti ludspektaklon ŝi saltas al iu melodramo.

Iun fojon, por komplezi al ŝi, mi diris, ke ankaŭ mi spertas ekvarmiĝojn, do ŝi asocias tion kun mi, menopaŭzon. “Kiel statas via ŝanĝiĝo?”, ŝi demandas laŭte anstataŭ salutoni. Kaj mi indignas pro tio, sidante tie, aĝiĝante, pensante.

Miaj filoj estas kreskintaj, do mi devas lui nur unu lavmaŝinon, sed unu lavo daŭras same kiel kvin.

(daŭras en paĝo 4 / continues on page 4)

Mi transloĝiĝis la pasintan semajnon, eble la ducentan fojon. Mi stakigis miajn litotukojn kaj kurtenojn kaj bantukojn en mian aĉetĉaron. La lavejo estis plenŝtopita; ne estis liberaj lavmaŝinoj unu apud la alia. Mi metis miajn aferojn en tri apartajn maŝinojn kaj iris al Ofelio por ŝanĝi dolarojn kontraŭ moneroj. Mi revenis, enmetis mian monon kaj lesivon, kaj startigis ilin. Sed mi startigis tri malĝustajn lavmaŝinojn. Tri, kiuj ĵus finlavis la vestojn de iu viro.

Iu metis min en embarason. Ofelio kaj la viro pendis super mi. Mi estas alta virino, mi portas ŝtrumpojn de la marko “Granda Panjo”, sed ili estis gigantaj. Ofelio tenis kontraŭmakulan ŝprucbotelon en sia mano. La viro portis ĝinzon tonditan en ŝorton, kaj liaj kruroj estis rufe vilaj. Lia densa barbo aspektis neniel hare, sed kiel ruĝa bufro remburita. Li portis kaskedon broditan per gorilo. La ĉapelo ne estis tro malgranda, sed tiom pezis liaj haroj, ke ili puŝis supren la kaskedon, ŝajnigante lin sep futojn alta. Li tamburis sian ruĝan manplaton per peza pugno. “Damne, fekdamne!” Ofelio ne minacis min; male, ŝi protektis min kaj estis preta interveni, aŭ inter nin, aŭ inter lin kaj la maŝinoj. Ŝi ĉiam diras, ke nenio en ŝia lavejo estas nesolvebla al ŝi.

“Sinjoro, sidiĝu kaj malstreĉiĝu. Oni ne povas haltigi la maŝinojn post la starto. Spektu iom da televido. Havigu al vi kolaon.”

Mi enpuŝis la monerojn en la fendetojn kaj startigis la ĝustajn maŝinojn. Nur tiam mi konstatis, ke mi estas tute senmona kaj senlesiva; tiuj moneroj devus esti por la sekigado. Mi ekploris.

“Kion damne priploras ŝi? Ĉi tio fuŝis mian sabaton, ĉu ne, ŝtipkapulino? Jesuo ploris.”

Mi diris al li, ke mi metos liajn vestojn en la sekigilojn, kaze ke li volas eliri.

“Mi ne lasus vin proksimiĝi al miaj vestoj. Restu for, komprenite?” Ne estis sidloko por li, krom tuj apud mi. Ni rigardadis la maŝinojn. Mi esperis, ke li iros eksteren, sed li nur sidis tie apud mi. Lia granda dekstra kruro vibris kiel turniĝanta lavmaŝino. Ses etaj ruĝaj lumoj brilis al ni.

Li demandis, “Ĉu vi ĉiam fuŝas ĉion?”

“Komprenu: Mi bedaŭras. Mi estis laca. Mi rapidis.” Mi komencis ridi nerveze.

“Kredu min, ankaŭ mi rapidas. Mi stiras trenkamionon. Po ses tagoj semajne. Po 12 horoj tage. Kaj jen, mia libertago.”

“Kial vi rapidis?” Mi intencis esti afabla, sed li sentis nur sarkasmon.

“Ho, megero! Se vi estus viro mi ellavus vin. Mi metus vian malplenan kapon en sekigilon kaj elektus la plej varman ciklon.”

“Mi diris, ke mi bedaŭras.”

“Diable, vi ja bedaŭru. Vi estas virinaĉo. Mi jam taksis vin povra eĉ antaŭ ol vi faris tion al miaj vestoj. Ho, mi ne komprenas ĉi tion. Ŝi ploras denove. Jesuo ploris.”

Ofelio staris super li.

“Ne ĉagrenu ŝin, komprenite? Mi scias, ke ŝi trapasas malfacilan etapon.”

Kiel ŝi sciis tion? Mi miris. Ŝi scias ĉion, ĉi tiu giganta nigra sibilo, ĉi tiu sfinkso. Ho, ŝi celas La Ŝanĝiĝon.

Mi diris al li, “Mi faldos viajn vestojn, se vi deziras.”

Ofelia replikis: “Silentu, kara! Estas vere, ke granda ĝeno ne estas. Post thent jaroj, ĝuste kiu zorgos pri ĉi tio?”

“Thent jaroj,” li flustris. “Thent jaroj.”

Kaj ankaŭ mi pensis pri tio. Cent jaroj. Niaj maŝinoj tremis, kaj ĉiuj el la etaj ruĝaj lumoj brilis.

“Almenaŭ viaj estos puraj. Mi eluzis ĉiom el mia lesivo.”

“Mi aĉetos por vi lesivon, je Kristo!”

“Jam tro malfruas, sed dankon.”

“Ŝi ruinigis ne mian tagon, sed la fektutan semajnon! Mankas lesivo.”

Ofelio revenis, kaŭris por flustri al mi:

“Mi makulas iom. La kuracisto diras, ke se ĝi ne ĉesos li devos forskrapi iom de la utera cerviko. Ĉu ankaŭ vi makulas?”

Mi balancis la kapon nee.

“Vi makulos. Virinaj defioj estas sendaŭraj. Plenan vivon da defioj! Mi pufiĝis. Ĉu vi?”

“Ŝia kapo pufiĝis,” diris la viro. “Do, mi iros al mia aŭto por preni bieron. Ĵuru, ke vi ne proksimiĝos al miaj maŝinoj. Viaj estas tridek kvar, tridek naŭ kaj kvardek tri. Ĉu vi komprenas?”

“Jes. Tridek du, kvardek kaj kvardek du.” Tio ne amuzis lin.

En la lavmaŝinoj, la vestoj turniĝis por sekiĝi. Mi devos pendigi ilin sur la palisaro por sekigi ilin. Pagite, mi revenos kun lesivo.

“Jackie Onnasis ŝanĝigas siajn litotukojn ĉiutage. Mensmalsane, laŭ mi.”

“Malsane,” mi respondis konsente.

Mi lasis la viron meti siajn vestojn en korbon kaj iri al la sekigiloj antaŭ ol mi deprenis la miajn de la lavmaŝinoj. Kelkaj homoj ridetis, sed mi ignoris ilin. Mi plenigis mian ĉaron per la malsekaj tukoj. Ĝi estis preskaŭ tro peza por puŝi; ne estis loko por ĉio. Mi devis porti miajn rozkolorajn kurtenojn per ŝultro. Trans la ĉambro la viro komencis diri ion, sed tuj turnis sin.

La iro hejmen postulis multe da tempo. Pli postulis la pendigado, sed mi trovis ŝnuron. Nebulo komencis flusi.

Mi verŝis por mi iom da kafo kaj sidiĝis sur la malantaŭa perono. Mi sentis min feliĉa, ne hastanta. La venontan fojon, kiam mi veturos per la rapidtrajno, mi eĉ ne pensos pri eliro ĝis post la halto de la trajno. Kiam ĝi haltos, mi eliros ĝuste antaŭ la pordofermo.